Esperanto. Oficiala organo de UEA. Monata. F. 1904, 20 p., 32×21 cm. *Gvid.*: D^{ro} ED. PRIVAT. *Adr.*: 12 Boulevard du Théâtre, Genève, svisaj. (Svis.). *Ab.*: 10.— Fr. jare. Kun membreco de UEA 12.50 Fr.

Oficiala Gazeto Esperantista. Apero laŭbezona. F. 1908, 25×16 cm. *Red. kaj Adr.*: 51 Rue de Clichy, Paris. *Ab.*: 10.— Fr. francaj por 6 numeroj.

Esperanto Triumfonta. Jurnalno internacia, universala sendependa. Semajna. F. 1920, 4 p., 49×31,5 cm. *Red.*: TEO JUNG. *Adr.*: Horrem bei Köln (Germanio). *Ab.*: Germanio: 10 numeroj 10.— Mk. Speciala aranĝo por ĉiuj landoj.

Internacia Komerca Revuo. Monata. F. 1919, 20 p., 23,5×15 cm. *Red.*: D^{ro} HJ. UNGER. *Adr.*: Hauptpostfach 6104, Zürich (Svisio). *Ab.*: 7.— Fr. svisaj jare.

Esperantista Laboristo. Monata. *F.* 1920, 8 p., 29×22 cm. *Red.:* E. ADAM. *Adr.:* 177 Rue de Bagnole, Paris. *Ab.:* 5.50 Fr. francaj jare. Aŭstrio & Hungario 30.— Kr., Bulgario 15.— L., Finnlando 10.— Fmk., Germanio 10.— Mk., Jugoslavio 20.— K., Rumanio 10.— L.

Literaturo. Trimonata gazeto Esperanta. *F.* 1919, 24 p., 18×12,5 cm. *Red.:* CHARLES H. EDMONDS. *Adr.:* "Rochwood" High Road, Wembley. *Ab.:* 2/6 ŝ. Brita Imperio; 3 ŝ.

Esperanta Ligilo. Universala gazeto por la blinduloj. Monata. *F.* —, 62 p., 26×18 cm. (En Brailla skribo). *Red.:* H. THILANDER. *Adr.:* Majorsgatan 12, Stockholm (Svedio). *Ab.:* ne montrita.

La Eklezia Revuo. Organo de la Eklezia Esperantista Ligo. *F.* 1918, 24 p., 25×16 cm. *Red.:* Pastro A. J. ASHLEY. *Adr.:* FARNLEY TYAS VICARAGE, Huddersfield (Angliolando). *Ab.:* 3 ŝ. jare.

Espero Katolika. Oficiala organo de la Internacio Katolika. Monata. *F.* 1903, 24 p., 22,5×15,5 cm. *Dir.:* PRO provincialo F. MEŠTAN, Schol. Piar. *Adr.:* JOHANN SCHRÖDER, Kaiserstrasse 10a, Wien VII. *Ab.:* 12.— Fr. sv. jare. Ponomere: 2.— Kr.; 1.— M.; 1.— Fr. ktp.

Kristana Espero. Trimonata revuo. *F.* 1920, 32 p., 22,5×16 cm. *Red.:* Ĉefpastro H. PÄTIÄLÄ. *Adr.:* S^{TO} HUGO SALOKANNEL, Laihia (Finnlando). *Ab.:* 10.— Fm. enlande; 5.— svisaj Fr. eksterlande.

La Esperantisto. Organo de Esperanta Universitato Popola. Monata. *F.* 1919, 4 p., 41×29 cm. *Red.:* DR^O ARDANTE POPOLAN. *Adr.:* Postamt 34, Wien II/I. *Ab.:* 1.— Fr. jare aŭ 4 Resp. kup.

Nova Tempo. Internacia Revuo por kulturlaboro. *F.* 1920, 8 p., 30×23 cm. *Red.:* DR^O EDM. SÖS. *Adr.:* Wien VI, Mollardgasse 55. *Ab.:* Por Aŭstrio 60.— Kr. aŭstr.; Germanio 10.— M.; aliaj landoj 7.50 Fr. sv.

La Unuigita Tuthomaro. Monata. *F.* 1916, 4 p., 27×19 cm. *Red.:* Pastro W. HEYDORN. *Adr.:* Bahai Verlag, Hamburg 35. *Ab.:* 6.— M. enlande; 7.50 M. eksterlande.

Vegetarano. Organo de Vegetara Ligo Esperantista. Apero laŭbezone. *F.* 1917, 6 p., 30×23 cm. *Red.:* OSCAR BÜNEMANN. *Adr.:* Alsterkingchaussée 586, Hamburg-Fuhlsbüttel. *Ab.:* 2 guldenoj nederlandaj. (Speciala aranĝo por landoj kun malalta kurzo.)

II. Naciaj.

BRITIO.

British Esperantist. The Official organ of the British Esperanto Association. Monata. *F.* 1905, 12 p., 24×18,5 cm. *Red. kaj Adr.:* British Esperanto Association, 17 Hart street, London W C 1. *Ab.:* 6ŝ aŭ 30 stampitaj respondkuponoj jare.

BULGARIO.

Bulgara Esperantisto. Organo de la Bulgara Esperantista Societo. Monata. *F.* 1919, 24 p., 23×16 cm. *Red. kaj Adr.:* Pl. Sveta Nedelja 6, Sofia. *Ab.:* 20 levoj enlande, 5.— Fr. sv. eksterlande.

ĈEĤOSLOVAKIO.

La Progreso. Ĉeĥoslovaka Organo Esperantista. Monata. *F.* 1918, 12 p., 27×18 cm. *Red.:* B. TITTL. *Adr.:* FRANT KAVAN, Poděbradova třída 6. *Ab.:* 20.— K. ĉ.

La Marto. Organo de Germanaj Esp. societoj en Ĉeĥoslovakio. Monata. *F.* 1920 (1912), 8 p., 27×20,5 cm. *Red.:* J. TAUBMANN. *Adr.:* Haida (Bohemio). *Ab.:* 16.— Kr. ĉ.; 40.— Kr. aŭstria; 40 Pmk.; 40.— Kr. hung.; 13.— Mk. germ. Aliaj landoj 20 respondkuponoj.

Esperantský zpravodaj. *F.* 1920, 16 p., 23,5×15,5 cm. *Red.:* Fimo JULIE SUPICHOVA. *Adr.:* Praha II, 2032. *Ab.:* 10.— K. ĉ. po jare.

Senhalte. Monata. *F.* 1920, 8 p., 21×16 cm, hektografiita. *Red.:* J. HALASZ. *Adr.:* Tisztviseľ-telep, Lučenec (Losoncz).

FINNLANDO.

Esperanta Finnlando. Organo de Esperanto Asocio de Finnlando. Monata. *F.* 1918, 20 p., 23,5×16 cm ilustrata. *Red.:* VILHO SETÄLÄ. *Adr.:* Esperanto Oficejo de Finnlando, Kasarminkatu 20, Helsinki I. *Ab.:* 30.— Fmk. jare; eksterlande 33.— Fmk.

FRANCIO.

Franca Esperantisto. Oficiala organo de la S. F. P. E. Monata. *F.* 1908, p. 24,5×19 cm. *Red.:* PRO TH. CART. *Adr.:* Rue de Clichy 51, Paris. *Ab.:* 8.— Fr. enlande, 10.— Fr. eksterlande.

Le Monde Espérantiste. Organe universel absolument indépend. Monata. *F.* 1908, 8 p., 32,5×24,5 cm. *Red.:* A. FRECHAS. *Adr.:* 3 Rue Sophie-Germain, Paris XIV. *Ab.:* 4.— Fr. enlande, 5.— Fr. eksterlande jare.

GERMANIO.

Germana Esperantisto. Oficiala Organo de Germana Esperanto Asocio. Monata. *F.* 1903, 24 p., 24×18,5 cm. *Red. kaj Adr.:* ADER & BOREL, Struvestrasse 40, Dresden 1, Poŝtĉekkonto Dresden No. 12781. *Ab.:* 12.— M. jare, eksterlande 15.— M.

La Laborista Esperantisto (Der Arbeiter-Esperantist). Oficiala organo de la Germana Laborista Esperantista Asocio. Monata. *F.* 1914, 6 p., 37×26,5 cm. *Red.:* P. RAUSCHENBACH. *Adr.:* F. HEGEWALD, A sternstrasse 36, Hannover. *Ab.:* jare 10.— M. enlande, 12.— M. eksterlande.

Esperanto Praktiko. Monata gazeto por perfektigo en la Lingvo Internacia. Mit Übungsteil für Esperantisten deutscher Zunge. Monata. *F.* 1919, 16 p., 23×15 cm. *Red.:* FR. ELLERSIEK. *Adr.:* Wissmannstrasse 46, Berlin S 59. *Ab.:* 10.— M. jare. Eksterlande: 12.— M. kaj 18.— M.

Mitteilungen des Nordalbingischen Esperanto-Verbandes (Sciigoj de Nordalbinga Esperanto Ligo). *F.* 1910, 4 p., 21×17 cm (hektografita). *Red. kaj Adr.:* H. BÖBS, Utecht bei Lübeck. *Ab.:* Ne montrita.

HISPANIO.

Hispana Esperantisto. Oficiala Organo de Andaluzia Federacio. Monata. *F.* 1915, 16 p., 22,5×16 cm. *Red.:* JULIO MANGADA ROSENÖRN. *Adr.:* S^{ro} J. MANGADA ROSENÖRN, majoro de la Inf. Regt. Galicia No. 19, Jaca (Huesca). *Ab.:* 4 pes. jare. Eksterlande 6 pes.

Kataluna Esperantisto. Oficiala organo de Kataluna Esp. Federacio. Monata. *F.* 1921 (Dua epoko), 12 p., 22×16 cm. *Red. kaj Adm.:* Carme 30, Barcelona. *Ab.:* 5 pes.

La Semisto. Eldono de Esp. Societo Aplech. Monata. *F.* 1918, 8 p., 22×16 cm. *Red. kaj Adr.:* Mendizabal 3, Barcelona. *Ab.:* Ne montrita.

HUNGARIO.

Hungara Esperantisto. Oficiala organo de la Hungarlanda Esp. Societo. Monata. *F.* 1918, 8 p., 24×15,5 cm. *Red.:* PETRO TURZÖ. *Adr.:* Szentháromság utca 30, Szeged. *Ab.:* 40.— Kr. jare, eksterlande 1 fr. sv:

ITALIO.

Itala Esperantisto. Organo Ufficiale della Federazione Esperantista Italiana. Monata. *F.* 1920, 16 p., 25×17 cm. *Red., Adm kaj Adr.:* Via Spiga 29, MILANO. *Ab.:* 10.— L. enlande; 15.— L. eksterlande.

NEDERLANDO.

La Holanda Pioniro. Oficiala organo de la Ned. Societo Esp. "La Estonto estas Nia". Monata. *F.* 1908, 16 p., 23,5×15,5 cm. *Red.:* H. C. MEES. *Adr.:* D^{ro} H. C. MEES, Sundastraat 21, 's Gravenhage. *Ab.:* Senpage por membroj, 1.25 fl. jare enlande, 2.10 fl. eksterlande.

Nederland Esperanto. Orgaan ter verbreiding van de Wereldhulpaal Esperanto in Nederland. Semajna. *F.* 1917, 4 p., 25×16 cm. *Red.:* A. KLOEK. *Adr.:* C. G. STERKENBURG, Spitaalstraat 3, Zutphen. *Ab.:* —.60 fl. kvaronjare.

RUSIO.

Esperantista Movado. Organo de Kronŝtadta Esp. Societo. Monata. *F.* 1920, 12 p., 22,5×18 cm. *Red. kaj Adr.:* Prospekto de Lenin 30, Kronŝtadt. *Ab.:* 50 Rb. po numero.

SVEDIO.

La Espero. Oficiala organo, por Sveda Esperanto Federacio kaj Norvega Esperantista Ligo. Monata. *F.* 1913, 8 p., 29,5×22,5 cm. *Red.:* PAUL NYLEN. *Adr.:* Eldona Societo Esperanto, Stockholm I. *Ab.:* Por Svedio: 3.50 Kr., Norvegio: 4.— Kr., Eksterlande: 4.50 Kr.

AMERIKO.

Amerika Esperantisto. Official organ of The Esperanto Association of North America. Monata. *F.* 1907, 16 p., 23×15 cm. *Red.:* Sino I. M. HORN, N. W. FROST kaj H. M. SCOTT. *Adr.:* Esp. Office, Pierce Building Copley Square Boston (Mass.). *Ab.:* 1.— Dol. jare.

Argentina Esperantisto. Oficiala organo de Argentina Esperanto Asocio. Monata. *F.* 1915, 4 p., 27×18,5 cm. *Red. kaj Adr.:* Belgrano 865, Buenos Aires (Argentino). *Ab.:* jare 2 Dol. enlande, 5.— Fr. eksterlande.

Brazila Esperantisto. Oficiala organo de Brazila Ligo Esperantista. Monata. *F.* 1909, 8 p., 27,5×18 cm. *Red. kaj Adr.:* Praça Quinze de novembro, Rio de Janeiro (Brazilo). *Ab.:* 3.— Dol. enlande, 5.— Fr. eksterlande, jare.

Esperanto. Organo del Centro Esperantista "Nova Sento". Monata. *F.* 1919, 8 p., 26,5×18 cm. *Red. kaj Adr.:* Santa Fé 77, Bahía Blanca (Argentino). *Ab.:* 2.50 Doll.

AZIO.

La Revuo Orienta. Organo de Japana Esperanto Instituto. Monata. *F.* 1919, 12 p., 23,5×15,5 cm. *Red.:* K. OSAKA. *Adr.:* Japana Esperanto Instituto Uŝigome Ŝin Ogauamaŝi III—14, Tokio. *Ab.:* 2,20 Jen.

Libereco. Monata. *F.* 1920, 58 p., 25×17 cm. *Red. kaj Adr.:* L. L. Y. North Szechuen Road Shanghai (Cinio). *Ab.:* 2 respondkuponoj po numero. (Ĉina anarkista gazeto kun titolpaĝo en Esperanto.)

Verda Utopio. Internacia Revuo Esperanta. Monata. *F.* 1920, 15 p., 19×13 cm. *Red. kaj Adr.:* 5265 Uehommači 7-ĉome, Minami-Ku, Osaka (Japanio). *Ab.:* 3 Jen jare.

AŬSTRALIO.

La Suda Kruco. Organo de la Aŭstraliaj Esperantistoj. Monata. *F.* 1920, 8 p., 21×14 cm. *Red. kaj Adr.:* Box 1367 Elisabeth Street, Post Office, Melbourne. *Ab.:* Aŭstralio 3 ŝ. (10 n-roj); eksterlande 3ŝ. 9 p., aŭ 18 respondkuponoj.

ESPERANTO — PRESAĴOJ

same kiel
gazetoj, katalogoj, libroj k. t. p.
— ankaŭ en ĉiuj naciaj lingvoj —
liveras plej zorge kaj prezinde

J. B. HIRSCHFELD (A. PRIES)

fondita en 1800 — **LEIPZIG** — fondita en 1800
Telefono 706 kaj 13030 — Brüderstrasse Nr. 59

Praktika kuniĝado . . .

estas afero, de kiu ofte dependas feliĉo kaj sukceso de la tuta vivo.

Ekzemple, ĉe multaj homoj ekzistas kapabloj kaŝitaj, vekataj nur post ekono kaj tiam valorigeblaj. Antaŭ ol dungi servistojn aŭ kunlaborantojn oni devas ekzameni iliajn ecojn; same antaŭ edziĝo oni devus demandi ĉu la karaktero de la du homoj sufiĉe harmonias. Sed kiamaniere juĝi la karakteron? Kiel ekkoni ecojn kaj kapablojn? — Ili estas ekkoneblaj el la manskribo. — En la skribo montriĝas ne nur la karaktero, sed ankaŭ la anima vivo kaj kapabloj de la skribint(in)o . . . Verŝajne Vi mem povas diveni la serdinton de certaj leteroj nur el la skribo de la adreso, ĉu ne? Kiel tio okazas laŭsente, tion esploris science la moderna grafologio. Antaŭ sep jaroj mi dediĉis min je scienca studado de psihologa grafologio. Intertempe mi prijuĝis pli ol 1000 skribaĵojn. Kion la ricevanto de miaj juĝoj opinias pri mia sperto, tion Vi vidas ekzemple el la jena letero de Sro U. Uoma (Helsinki): “Mi tre dankas Vin pro Via juĝletero . . . Nun mi konfesas al Vi, kiom via juĝo estis kontentiga mian karakteron . . . Mi sendas al Vi novan skribaĵon (de konatolino) . . .” Simile multaj aliaj dankis al mi pro miaj konsiloj. *Nun miaj kapabloj kaj konoj estas ankaŭ je Via dispono.* Je memekkono (por memeduko, ĉe ekprenado de profesio, por ekono de kaŝitaj kapabloj valorigeblaj) kaj por prijuĝo de aliaj homoj (ĉe kuniĝo kun komerca partoprenanto, ĉe fianĉiĝo, ĉe dungado): Vi ekzamenigu karakteron kaj kapablojn, sendante al mi skribprovojn por prijuĝo. Mi ellaboros “Portreton de karaktero” de la skribint(in)o kun priskribo de siaj ecoj valoraj kaj danĝeraj.

Kondiĉoj por ellaborado de “Portreto de karaktero”.

- 1) **Materialo:** Minimume 25—40 linioj, inke skribitaj, de kutima skribo; prefere 2—3 diversaj leteroj. Sufiĉas skribaĵoj en iu nacia lingvo, ĉar pri enhavo mi tute ne atentis. Ĉiuj skribaĵoj estas resendotaj.
- 2) **Sciigoj necesaj:** Aldiku sekson, proksimuman aĝon, kaj profesion de la skribint(in)o. Aldono de fotografaĵo dezirinda, sed ne deviga.
- 3) **Kompenso,** sendota kune kun la skribprovaĵoj: 3 fr. svisaj aŭ la korespondanta valoro en naciaj bankbiletoj, aŭ 30 Markoj en bankbiletoj germanaj. Akceptataj ankaŭ 15 stampitaj respondkuponoj. Por kurzsufierantaj landoj speciala kondiĉo laŭ demando.
- 4) **Demandoj specialaj:** Mendante “Portreton de karaktero”, bonvolu skribi por kiu celo Vi deziras ĝin kaj kiuj demandoj estu ĉefe respondotaj. Ju pli detale Vi demandas, despli mia laboro utilos al Vi . . . Ĉiun aferon mi traktas absolute diskrete.

Skribu, antaŭ ol fari malagrablajn spertojn!

Adreso: Grafologa Konsilanto Kurt Kauffmann, Heidelberg (Germ.)


OLIVAJ OLEOJ

Altkvalitaj
Pureco garantiita



**Anonima Societo
Nicea de Olivoleoj**

(Société Anme. Niçoise d'Huiles d'Olive)



Kapitalo: 1 600 000 fr.



NICE (FRANCIO)

Ekspedoj por ĉiuj landoj
Oni akceptas agentojn.




**INTERNACIAJ FOIROJ
DE FRANKFURTO** APUD
MAINO
ĈIUJARE EN PRINTEMPO KAJ EN AŬTUNO

Ampleksa
ekspozicio el 30 branĉoj
IMPORTO KAJ EKSPORTO



Prospektoj kaj branĉolistoj en
pluraj lingvoj kaj en Esperanto



Katalogo kun registro en 9 lingvoj
kaj en Esperanto




Korespondo en Esperanto!

PETU DETALOJN KAJ INFORMOJN DE

MESSAMT
ESPERANTO-FAKO

FRANKFURT AM MAIN
GERMANUJO



Akcia Societo de la Fer- kaj Ŝtalfandejoj
Anfaŭe Georg Fischer
Schaffhausen (Svisio).

Svisa entrepreno kun Svisa kapitalo. Fondita 1804. 4500 laboristoj

Fandaĵoj ĉiaspecaj por ĉiuj bezonoj de la industrio kaj de la metiistoj

Maŝina ŝtalfando	marko	+GF+
Dinamo ŝtalfando	marko	+GF+
Aŭto-special-ŝtalfando	marko	+GF+
Tempero-ŝtalfando (mola fando)	marko	+GF+
Speciala Tempero-ŝtalfando: "Tenax Compact"	marko	+GF+

Tenax Compact estas materialo kun speciale alta rezisto kaj streĉemo

Elektro-ŝtalfando	marko	+GF+
Malmola ŝtalfando por cement-kaj kalkfabrikejoj	marko	+GF+





TUBKUNIGILOJ (Fitingoj)

(Marko: **+GF+**)



por kondukiloj de gaso, akvo, vaporo, ktp. de 1/8 ĝis 6 anglaj coloj, taŭgaj por ĉiuj tuboj de eŭropa deveno, ekzamenitaj sub 18 atmosferoj de premo. Ĉirkaŭ 7000 diversaj modeloj; grandegaj provizoj por tuja liverado. Riĉa kolekto de specialaj fittingoj por centra hejtado. Fitingoj por balustradoj, kaj kompletaj balustradoj el tuboj kaj fittingoj. Tuj liverablaj nigraj, zinkitaj, poluritaj aŭ nikelitaj.

Korespondado en ĉiuj lingvoj.




Stolberg Rhld. (Germanio)

PRYM & CO

Niaj 4 specialaĵoj



Lavmaŝino
 "LORE"



Bakforno
 "RAPID"



Ladoskatoletoj surpresitaj
 kun aŭ sen
 malfermitoj

Filtriloj por
 gasoj, aero
 kaj fluaĵoj

Demandu pri katalogoj kaj proponoj



LOCARNO (elp. Lokarno) Lago Maggiore

Suda Svisio

200 metroj s/maro — 9000 loĝantoj

La plej dolĉa klimato je tuta Svisio por la restado dum printempo kaj aŭtuno-vintro. Fremdulstacio. Turista centro. Mirindaj promenadoj en la ĉirkaŭaĵoj kaj al la apudaj montoj, 200 ĝis 3276 metroj s/maro. Fervojoj, vaporŝipoj, flugmaŝinoj, tramvojoj, regionaj elektr. fervojoj. 40 hoteloj kaj pensionoj, teatro, kursalo. Fama sanktejo Madonna del Sasso kun mondfamaj vidindaĵoj. Sudaj arboj kaj floroj: palmoj, olivoj, citronoj k. t. p. — Senpagaj gvidlibroj: esperantaj, italaj, francaj, germanaj, anglaj. Oni skribu al "Ufficio Informazioni" Locarno.

Fremduloj, vizitantaj la LAGON MAGGIORE, gastigu ĉe la **HOTEL BELVEDERE** en **LOCARNO** (elp.: LOKARNO)

famkonata hotelo malfermita la tutan jaron: ĉiu komforto, elektra lumo, centra hejtado, banĉambroj, granda ĝardeno, vinberejoj, promenadcentro, mirinda vidaĵo sur la tuta lokarnan regionon kaj sur la lagon. Familia traktado; specialaj kondiĉoj por familioj; rabato por esperantistoj.
Gefratoj Franzoni, posedantoj.

Trovojaĝante itallingvan Svision Kantono Tiĉino

ne forgesu viziti en LOCARNO la tabakvendejon de Giugni Liberata, arkadot hotelo Métropole, kie vi povas malkare aĉeti: naciajn kaj enportitajn cigarojn kaj cigaredojn, cigaringojn, cigarujojn, ĉokoladon, gazetojn, memoraĵojn k. t. p.
Oni parolas kaj korespondas en Esperanto.

Agentejo de nemoveblaĵoj DANZI en LOCARNO (Lago Maggiore) kaj LUGANO (itallingva Svisio)

Reprezentado; vendoj; aĉetoj; luado kaj ŝanĝado: bieno, domoj, hoteloj, vilaoj, industriaj posedaĵoj; magazenoj, fabrikoj k.t.p. Multegaj rekomendoj.

Senpagaj servoj por la aĉetantoj kaj luantoj. Oni korespondas en la lingvoj: itala, esperanta, franca, germana, angla.

FRANZONI, NESSI & CO.

Kalkul- kaj administracia oficejo
Agentejo por nemoveblaĵaferoj — Kopiistejo
— Tradukadoj — Reprezentadoj —

LOCARNO (SVISLANDO)

WIESBADEN

INTERNACIA SANIGEJO KAJ BANURBO

Rekte atingebla per rapid- kaj litvagonaroj de preskaŭ ĉiuj eŭropaj grandurboj kaj havenoj.

Plena kuraca funkciado dum la tufa jaro.

Varmaj kuirsalaj fontoj de 65, 70 Celsius.

Senkonkurencaj sanigrezultoj je artrito, reŭmatismo, artikaj malsanoj, ostarompoj, paralizo, neŭralgio, malsanoj de la spiraj kaj digestaj organoj, nervmalsanoj k. t. p.

Ĉiuj modernaj sanigmetodoj.

Pli ol 200 kuracistoj, inter ili eminentaj specialistoj por ĉiuj malsanoj

150 plej modernaj bandomoj, enspirejoj, kuracad-hoteloj, pensionoj, sanigejoj, klinikoj kaj sanigaj institutoj provizitaj je ĉiu komforto estas seninterrompe en plena funkciado.

Bonegaj kondiĉoj de loĝado kaj nutrado.

Belega "Kurhaus". Riĉe subtenata ŝtata teatro.

Ĉiutage zorge elektitaj amuzaĵoj: koncertoj, opero, teatraĵoj.

Ĉiuseca sporto: Teniso, golfo, ĉevalkuradoj.

Alveturo nemalhelpata. Sufiĉas vizode germana pasporta oficejo, en la aliancaj landoj vizo de la hejma pasporta oficejo.

Daŭro de la restado senlima.

Prospekto senpage

Städtisches Verkehrsbureau
Urba oficejo por trafiko

DRIA PARTO.

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO.

Statuto de UEA.

I. Celoj kaj principoj.

1. Sub la nomo *Universala Esperanto-Asocio* ekzistas Asocio, fondita en 1908, kiu celas:

Disvastigi la uzadon de la internacia helpilingvo Esperanto; Plifaciligi la ĉiusecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo;

Krei internaciajn servojn uzeblaj de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio; Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj.

2. UEA estas neŭtrala rilate al religio, nacieco aŭ politiko. En ĝi viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteblaj al ĉiuj oficejoj.

3. La oficiala lingvo de UEA estas la Zamenhofa Lingvo Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika verkaro.

4. La sidejo de UEA troviĝas ĉe sia Centra Oficejo, en Genève, Svislando. UEA deklaras sin asocio kun celo ideala kaj je ne limigita daŭro, konforme al art. 60 de la svisa civila kodo. La Centra Oficejo de UEA estas oficiale nomata: "Internacia Esperanto Oficejo", "Bureau international de l'Espéranto", "Internationales Esperantoamt", k. t. p.

La Komitato rajtas translokigi la sidejon de la asocio kaj oficejo en alian svisan lokon, kaj laŭbezone ilin enskribi en- kaj eksterlande en la ŝtatajn registrojn por societoj.

5. La oficialaj publikigoj de UEA fariĝas per la Jarlibro, per la gazeto "Esperanto", per bultenoj aŭ cirkuleroj. La Asocio rajtas eldoni ĉiusecajn presajn rilatantaj al ĝia celo kaj agado.

La administra jaro kalkuliĝas de 1 Novembro ĝis 31 Oktobro.

La tempolimoj fiksitaj per tiu statuto aŭ regularoj valoras por Eŭropo. Por la rilatoj el lokoj kun speciale malfacilaj poŝtaj komunikoj aŭ el aliaj kontinentoj la Direktoro plilongigas tiujn tempolimojn.

6. Por ĉiuj membroj estas devigaj tiu statuto kaj la ĝeneralaj regularoj de la asocio.

Por la agoj de siaj reprezentantoj, oficistoj, k. t. p. la asocio estas nur respondeca, se tiuj agoj okazis en la limoj de la kompetenteco, kiun por ĉiu ofico difinas ĉi-tiu statuto aŭ la regularoj.

La asocio malakceptas ĉiun financon respondecon por la funkciado de la servoj kaj por negocoj al ili rilatantaj.

7. La havaĵo de UEA estas destinata al la esperanta movado. La membroj nek havas personan rajton je tiu havaĵo, nek estas respondaj por la ŝuldoj de la asocio.

II. Membroj, Fakoj, Societoj.

Membroj.

8. Povas esti akceptata kiel membro ĉiu honorinda persono, favora al la principoj de UEA.

La *Membroj* (M) pagas la kutiman jaran kotizon, kaj eblan enirpagon, fiksitan de la Komitato.

Membroj-Abonantoj (M. A.) estas membroj, pagantaj kun la kotizo la abonon al la gazeto "Esperanto", laŭ favoraj kondiĉoj al ili rezervataj.

Membroj-Subtenantoj (M. S.) estas membroj, kiuj, por helpi al la asocio, pagas la por ili fiksitan pli altan kotizon-abonon.

Dumvivaj membroj (D. M.) estas la akirintoj de almenaŭ unu atesto de la "Garantia Kapitalo" (art. 49) kaj la personoj havantaj tiun rajton konforme al la ĝisnuna statuto. Ili estas liberigataj je ĉiu plia kotizo aŭ abonpago.

Honoraj membroj (H. M.) estas la personoj, kiujn, pro gravaj servoj aŭ donacoj faritaj al la asocio, la Komitato distingas je tiu titolo. Ili ne pagas kotizon.

9. La membroj rajtas:

Elekti la Delegiton kaj Vicedeleiton; voĉdoni en la kunveno de sia loko kaj en kongreso de UEA; ĉeesti ĉiujn membro-kunvenojn aŭ manifestaciojn aranĝitaj sub la nomo de la asocio;

Iniciati voĉdonon de la Delegitoj, partopreni je la ĝenerala skriba voĉdonado kaj plendi konforme al art. 59;

Ricevi membrokarton, la jarlibron kaj uzi la ĝeneralajn servojn. Subtenantaj, Dumvivaj kaj Honoraj membroj ricevas laŭeble pliajn presajojn.

La prezojn de la kotizoj kaj membro-abonoj fiksas la voĉdonado de la Delegitoj. La organizantoj de festoj aŭ kongresoj rajtas postuli enirpagon, por kovri la kostojn. Escepte tio, la membroj ne povas esti devigataj pagi pliajn sumojn por la bezonoj de la asocio.

10. La Delegito kolektas la aliĝojn, enkasigas la kotizojn de sia loko, kaj sendas ilin en tempolimo de du semajnoj al la Centra Oficejo. Ĉi-tiu ankaŭ akceptas senperajn pagojn, aŭ enkasigas mem, se mankas Delegito aŭ pro aliaj gravaj kaŭzoj.

Delegito kaj Direktoro rajtas malakcepti aliĝproponojn. Delegito rifuzinta aliĝon raportas al la Direktoro. Same la Direktoro, se li rifuzis aliĝon akceptitan de Delegito, informas tiun Delegiton. Malinterkonsentojn inter ili decidas la Prezidanto.

Se malakceptita kandidato tion speciale deziras, oni informas lin pri la motivo. Ĝis 30 tagoj post alveno de tiu klarigo, tri membroj rajtas kune peti la Prezidanton, ke li prijuĝu la aliĝproponon.

11. La membreco komencas kun la enskribo en la membra kontrolo de UEA. La jara kotizo estu pagata ĝis fino de marto, prefere al la loka Delegito, aŭ al la Centra Oficejo. Poste la oficejo laŭeble avertas la nepagintojn aŭ sendos al ili poŝtrepajlojn. Estas forstrekataj la membroj kiuj eksigis, aŭ kies kotizoj nek alvenis ĉe la oficejo ĝis fino de julio, nek povis esti deprenataj de ebla bonhavaĵo.

Fakoj.

12. *Fako de UEA* nomiĝas organizita grupiĝo de membroj, kiuj volas plivigli la rilatojn inter si, por esperantistaj, profesiaj aŭ aliaj ne kontraŭstatutataj celoj. La fakoj starigas propran statuton, elektas Fakestron kaj eblan komitaton, povas postuli specialan kotizon de la fakanoj kaj krei servojn al ili rezervatajn.

La Komisiono de UEA, konforme al la ĝeneralaj interesoj de la asocio, decidas pri akcepto aŭ ĉesigo de fakoj kaj privoĉdonas iliajn statutojn. La elekto de Fakestro estas submetata al la aprobo de la Prezidanto de UEA, kiu nomas Fakestron, se elekto per la fakanoj ne povis okazi. La Fakestroj havas propon-rajton ĉe la Komisiono. Ĉiun jaron ili raportas ĝis fino de novembro al la fakanoj kaj al la Direktoro.

La fakoj administras sin mem, konforme al la metodoj de la Asocio. Kun la konsento de la Direktoro ili povas transdoni tuton aŭ parton de siaj negocoj al la Centra Oficejo, kiu malfermas al ili kontojn. La Komisiono povas doni monsubtenojn al fakoj tre gravaj aŭ kiuj faras servojn al ĉiuj membroj.

La ĉefaj informoj de la fakoj aperas en la oficiala gazeto.

Entreprenoj.

13. *Entreprenejoj* de UEA estas nomataj la societoj, korporacioj, firmoj k. t. p., kiuj, pagante ĉiujare fiksan sumon, deziras esprimi sian simpatian al UEA aŭ rilati kun la Esperantistoj. Ili rajtas publikigi sian nomon en speciala parto de la jarlibro kaj ĝuas aliajn favorojn, konforme al regularo.

Tiom kiom la laboro de la oficejo tion permesas, la Direktoro rajtas helpi al la poresperantaj klopodoj de membroj aŭ entreprenoj, konsentante, ke la oficejo peradu por ili leterojn, funkciu kiel pagejo, k. t. p.

Societoj.

14. La asocio povas fari ĉiajn kontraktojn laŭ la bezonoj de sia agado.

Kun societoj, korporacioj, firmoj kun celoj similaj al tiuj de UEA, aŭ kies kunlaboro aŭ simpatio estas dezirindaj, la Komisiono rajtas fari interkonsentojn pri komuna agado, pri interŝanĝo de servoj, k. t. p. Ĝi povas helpi al tiaj societoj, meti je ilia dispono spacon en la oficiala gazeto, kaj doni al iliaj reprezentantoj konsilan voĉon interne de la asocio.

Societoj kaj firmoj, entreprenoj kaj aliaj, ne estas membroj de UEA. Pri ilia agado la asocio ne respondas, sed post ricevo de pravigitaj plendoj ĝi ĉesigas la rilatojn kun ili.

Organizo.

15. La organoj de la asocio estas:

Kunvenoj kaj skribaj voĉdonoj;

La loka Delegito kaj Vicdelegito; la Delegito por specialaj celoj;

La Ĉefdelegito kun sia Sekretario; la Fakestro;

La Komitato, la Komisiono, la Prezidanto;

La Centra Oficejo, kun Direktoro, Vicdirektoro kaj oficistoj;

La Redakcio, kun la Redaktoro de "Esperanto" kaj eblaj oficistoj.

Ĉiuj personoj havantaj oficon devas esti membroj.

III. Delegitoj kaj Ĉefdelegitoj.

Delegitoj.

16. En ĉiu loko, grava pro sia granda, siaj komercaj aŭ turismaj rilatoj, la asocio klopodas elekti *Delegiton* kaj *Vicdelegiton*.

La Delegito reprezentas UEA kaj administras ĝiajn lokajn aferojn, konforme al la instruoj de la Direktoro.

La Vicdelegito estas la kunlaboranto kaj anstataŭanto de la Delegito. Ĉiuj reguloj por la Delegito valoras laŭsence por la Vicdelegito.

Sub sia respondeco la Delegito povas nomi *Agentojn* aŭ *Helpantojn*, kiuj rilate la Asocion nek havas oficialan rolon, nek uzu titolojn je oficiala aspekto.

Delegitoj por Komerco aŭ aliaj specialaj celoj estas elektataj okaze de la starigo de tiaj servoj. Ne koncernas ilin la sekvantaj artikoloj.

17. En unu loko estu kutime nur unu Delegito kaj Vicdelegito.

Grandegaj urboj povas esti dividataj en partoj kun po unu Delegito kaj Vicdelegito, sub la gvidado de Ĉefdelegito, kiu reprezentas la tutan urbon.

Kie la esperantista movado estas malforta, pluraj lokoj dissemitaj povas esti administrataj de unu Delegito kaj Vicdelegito.

Najbaraj Delegitoj fiksas inter si la geografiajn limojn de sia agadkampo. Se necese, decidias la Direktoro.

18. La elekto de Delegito fariĝu laŭeble konforme al jenaj principoj: Li bone konu la esperantan lingvon kaj movadon; li abonu kaj regule legu la gazeton de la asocio; li estu plenaĝa enlandano daŭre loĝanta en sia loko, kaj, sub la kutima rezervo de gravaj malhelpoj, promesu plenumi sian oficon tri sinsekvajn jarojn.

En lokoj, kie loĝas minimume 10 membroj, ĉi-tiuj elektas la Delegiton kaj Vicdelegiton. Kie ne povis okazi regula elekto, kaj en lokoj kun malpli ol 10 membroj, la Delegito kaj Vicdelegito estas elektataj de la Direktoro.

Ilia ofico daŭras ĝis la laŭstatuta elektado de la Delegitoj, okazanta ĉiun trian jaron.

Se en loko por kiu la Direktoro elektis la Delegiton, troviĝas poste 10 membroj, ili povas okazigi propran elekton.

19. La elektitaj Delegitoj estas publikigataj en la oficiala gazeto. Se ĝis 30 tagoj post ĝia forsendo neniun membro protestas pro gravaj kaŭzoj, la elekto fariĝas valora. Intertempe la Delegito funkcias provizore.

Se la Direktoro opinias, ke nova Delegito ne taŭgas por la ofico, li rajtas haltigi la publikigon, informante la elektiton pri siaj motivoj. Ĝis 30 tagoj post la informo, se kontraŭstaras iu membro aŭ la Direktoro, la rifuzito aŭ liaj elektintoj povas peti la finan decidon de la Prezidanto.

20. La Delegito:

Reprezentas en sia loko la Asocion, kaj rilate al la estraro de UEA siajn membrojn;

Propagandas, varbas membrojn, enkasigas kotizojn kaj prizorgas la administrajn aferojn;

Respondas la informpetojn de la membroj kaj helpas ilin okaze de vojaĝo;

Klopodas starigi en sia loko la aliajn oficialajn servojn kaj kontrolas ilian funkciadon;

Konservas en bonordo ĉiujn leterojn kaj dokumentojn koncernantaj ilian oficon.

21. La Delegiteco estas honora ofico.

La Delegito rajtas rifuzi laŭregularan peton de servo, kiun li kredas ne akordigebla kun sia honoro aŭ konscienco. Li sciigas pri tio la petinton.

Al membroj, kiuj misuzas la aranĝojn de la asocio, li rajtas rifuzi siajn servojn, informante la petinton kaj la Direktoron.

Libervole farante servojn al ne-membroj, li klopodas ilin varbi por UEA. Li nek faras servojn, nek metas aranĝojn de la asocio al la dispo de personoj, kiuj nur volas profiti je ĝi.

22. La Delegito kvitancaas por la asocio la ricevitajn kotizojn, sed li ne estas kompetenta fari en ĝia nomo elspezojn aŭ mendojn.

Por kompensi siajn personajn elspezojn kaj laŭeble tiujn de siaj kunlaborantoj, la Delegito deprenas de la kotizoj de li ĝustatempe enkasigitaj la parton por tiu celo fiksitajn. Procentaĵoj je lia favoro estos ankaŭ starigitaj por la pagoj de la Entreprenoj, por anoncoj en la jarlibro, k. t. p.

Ĉiuj sumoj ricevataj por la asocio devas esti sendataj afranke al la Centra Oficejo en tempolimo de du semajnoj.

El donacoj, vendoj, k. t. p. povas esti kreata loka kaso por helpi la agadon de la Delegito. Pri tiaj kasoj decidita la membroj; UEA ne estas responda por ili.

23. En lokoj kun minimume 10 membroj la Delegito kunvenigas la membrojn almenaŭ unufoje ĉiujare, prefere dum aŭtuno. Kunveno devas esti aranĝata: por elekti Delegiton, kaj se tion petas kvinono de la lokaj membroj aŭ la Direktoro.

La ĉefaj traktotaĵoj estas konatigitaj per invitilo, unu semajnon antaŭe. La kunveno elektas prezidanton kaj protokoliston, aŭdas la raporton de la Delegito, esploras faritajn proponojn kaj fiksis laŭ ili la lokan agadon de la asocio. La Delegito ne estas elektebla kiel prezidanto de kunveno. Laŭ postulo de la Delegito aŭ de kvinono de la ĉeestantoj, oni voĉdonas skribe.

La elekto de Delegito aŭ Vicelegito nur valoras, se ĉeestas minimume la duono de la membroj, kaj se la kandidatoj ricevis pli ol la duono el la voĉoj de la kunvenintoj. Se tiuj kondiĉoj ne estas plenumataj, la ĉeestantoj decidu, ĉu oni aranĝos novan kunvenon aŭ voĉdonos per la poŝto. Tiun duan fojon sufiĉas la simpla plimulto de la donitaj voĉoj.

24. Se Delegito ne plu povas plenumi sian oficon, pro foriro el la loko, grava malsano, morto, k. t. p., la Vicelegito informas la Direktoron. Se estas malpli ol 10 membroj, li indikas samtempe ĉu li estas preta fariĝi Delegito kaj kiun novan Vicelegiton li proponas.

Se li havas minimume 10 membrojn, li okazigas en tempolimo de 60 tagoj la elekton de nova Delegito.

De la antaŭa Delegito la nova reprenas la materialon, kaj el la aktoj tion, kion li bezonas por sia agado.

Ĉefdelegitoj.

25. Por grandega urbo, landparto aŭ tuta lando povas esti elektata Ĉefdelegito kaj anstataŭanto. Lia geografia agadkampo nomiĝas: "Teritorio de UEA". La limoj de teritorio akordiĝu kun la ŝtataj landdividoj, kiel regionoj, provincoj, k. t. p., se la praktikaj bezonoj ne konsiligas alian apartigon.

Teritorio estas fikсата per decido de la Komisiono, ĉu laŭ propra iniciato, ĉu laŭ peto de almenaŭ 15 najbaraj Delegitoj, kune reprezentantaj minimume 75 membrojn. La Komisiono ĉiam rajtas dividi aŭ kunigi teritoriojn.

La Komisiono elektas la Ĉefdelegiton kaj lian anstataŭanton. En teritorioj kun la supre citita nombro de Delegitoj kaj entute 75 membroj, la Delegitoj mem elektas la Ĉefdelegiton kaj anstataŭanton, rezervante la aprobon de la Prezidanto.

26. Al Ĉefdelegito la Komisiono povas doni jenajn taskojn:

Reprezenti la asocion en sia teritorio, konsili kaj gvidi la Delegitojn, koncentrigi la administradon kaj certajn servojn ĉe sekretariejo, de li kontrolata;

Propagandi por la asocio kie ĝi ne estas sufiĉe reprezentata, elektigi Delegitojn kaj funkciigi la servojn;

Peradi la rilatojn inter la Centra Oficejo kaj la Delegitoj, en teritorioj tre malproksimaj aŭ kun speciale malfavoraj poŝtaj kondiĉoj.

Kun la konsento de la Direktoro povas esti donataj al Ĉefdelegito kelkaj el la direktoraj kompetentecoj, speciale la elekto de Delegitoj ne havantaj 10 membrojn. La Ĉefdelegito raportas ĉiujare ĝis fino de novembro al la Direktoro pri sia agado, la sekretariejo kaj eblaj kasaferoj.

27. La Ĉefdelegito kunvenigas la Delegitojn kaj la aliajn membrojn de sia teritorio almenaŭ unu fojon jare, prefere dum nacia esperantista kunveno. Li raportas, preparoligas la agadon de UEA, k. t. p. Tiuj kunvenoj decidita ĉion, kion ili juĝas utila al la progreso de UEA en la teritorio. La procedo estas laŭseca la sama kiel dum loka kunveno, sed Ĉefdelegito kaj anstataŭanto, elektitaj de la Delegitoj, ne rajtas funkcii kiel prezidanto aŭ protokolisto. La Delegitoj povas doni voĉrajton al la ĉeestantaj membroj, escepte pri elekto de Ĉefdelegito kaj pri teritoria kaso, plenigita el Delegitaj procentaĵoj.

28. En teritoriaj aferoj ĉiu Delegito havas unu voĉon. La kvinono el ili kaj same la Direktoro rajtas peti, ke la Ĉefdelegito organizu korespondan voĉdonadon pri elekto aŭ alia grava negoco. La elekto de Ĉefdelegito kaj anstataŭanto estas skriba kaj fariĝas ordinare dum kunveno, alie per la poŝto. Elekto nur valoras, se voĉdonis en kunveno almenaŭ la duono, en la koresponda procedo almenaŭ du trionoj de la teritoriaj Delegitoj, kaj se la kandidatoj ricevis pli ol la duono de la voĉoj. Se du korespondaj voĉdonadoj ne donis rezultaton, decidas la Prezidanto.

29. Kie troviĝas la necesaj rimedoj, la Ĉefdelegito kaj la Direktoro elektas kune *Sekretarion* de UEA.

La Sekretario helpas la Ĉefdelegiton, reprezentas la Centran Oficejon, prizorgas administrajn laborojn konforme al la instruoj de la Direktoro, kaj faras se necese parton de la servoj anstataŭ la Delegitoj.

Laŭeble la Sekretario estas pagata el donacoj por tiu celo, el procentaĵoj de kotizoj, abonoj kaj vendoj, el teritoria kaso, k. t. p. Al Sekretarioj, kies laboro notinde malŝarĝigas la Centran Oficejon, la Direktoro rajtas konsenti rabaton ĝis 10% je ĉiuj sumoj alsendotaj. La Komisiono povas kuraĝigi la Sekretariojn per monsubtenoj aŭ premioj, se la financa stato de la asocio tion permesas.

30. Por ebligi la pagon de Sekretario kaj por aliaj asociaj celoj povas esti kreata *Teritoria Kaso*. Ĝia havaĵo apartenas al UEA, sed la asocio ne respondas por ĝiaj ŝuldoj.

Se la kaso devas esti plenigata el la Delegitaj procentaĵoj, la kondiĉoj estas: ke la Delegitoj rezignas minimume je la duono de siaj procentaĵoj favore de tiu kaso, kaj ke la decidon akceptas skribe tri kvaronoj de la Delegitoj en la teritorio. Decido tiel akceptata fariĝas deviga por ĉiuj Delegitoj, kaj valoras ĝis la fino de la jaro, dum kiu ĝi estis forigita per la sama procedo. La havaĵon administras kasisto elektita de la kunveno, kaj la Ĉefdelegito ĝin laŭofice kontrolas.

IV. Centra Organizo.

Komitato kaj Komisiono.

31. La ĝenerala gvidado de la asocio estas komisiata al *Komitato*. Ĝi konsistas el 15—25 membroj diversnaciaj, elektitaj de la Delegitoj por tri jaroj.

Se pro iuj kaŭzoj fariĝas en ĝi lokoj liberaj, tiam la Komitato povas, kaj, se alimaniere lando aŭ grupo de landoj estus tute ne reprezentata, la Komitato devas sin rekompletigi mem ĝis la proksima elekto. Je la fino de ĉiu periodo la Komitato decidas, konforme al la divastiĝeco de la Asocio, kiom da membroj enhavu la elektota Komitato.

32. La Komitato:

Elektas inter siaj membroj: La Prezidanton, la Vicprezidanton kaj la Komisionon de UEA. Plie ĝi elektas: la Direktoron kaj Vicedirektoron, la Redaktoron kaj la honorajn membrojn. Ĝi rajtas elekti honoran Prezidanton.

Fiksas la ĝeneralan agadon de UEA laŭ la voĉdonoj de la Delegitoj kaj la deziresprimoj de la Kongreso;

Privoĉdonas la jaran raporton kaj kontrolas la administradon de la asocia kapitalo;

Decidas pri apelacioj, kaj pri la aliaj aferoj al ĝi rezervataj.

33. La *Prezidanto* de UEA reprezentas la asocion en ĉiuj eksteraj, ne pure administraj rilatoj, kaj subskribas kun la Direktoro la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Komitaton kaj Kongreson. Persone aŭ ilin transdonante al alia Komitatano, li prizorgas la pliajn taskojn al li destinatajn per tiu statuto aŭ regularoj. En urĝaj kaj gravaj okazoj li havas la kompetentecojn de la Komitato aŭ Komisiono, al kiuj li raportos plej baldaŭ. La *Vicprezidanto* helpas kaj anstataŭas lin.

34. La *Komisiono* konsistas el la Prezidanto aŭ Vicprezidanto de UEA, kaj, laŭ decido de la Komitato, el 4 aŭ el 6 pliaj Komitatanoj, loĝantaj en landoj ne tro malproksimaj de la oficiala sidejo.

La Komisiono:

Decidas konforme al la instrukcioj de la Komitato pri ĉiuj aferoj superantaj la kompetentecojn de la Direktoro, Redaktoro kaj Ĉefdelegitoj;

Starigas novajn servojn aŭ aranĝojn, fiksante la ĝeneralajn regularojn pri ili; voĉdonas pri la fakoj;

Kontrolas la Centran Oficejon kaj la Redakcion;

Administras la kapitalon de la asocio;

Prizorgas la aliajn aferojn al ĝi komisiitaj de la Komitato aŭ per tiu statuto.

35. Komitato kaj Komisiono laboras per rondiranta kajero aŭ per cirkuleroj. Ili kunvenas ĉiujare okaze de la Kongreso, la Komisiono se eble pli ofte. En la voĉdonoj valoras la simpla plimulto, okaze de voĉegaleco decidas la Prezidanto. Tiom kiom permesas la cirkonstancoj, elekto, ĉe kiu neniu kandidato ricevis la absolutan plimulton, estu ripetata ĝis unu ĝin atingas. Valoras provizore kaj devos poste esti submetataj al nova voĉdono: decidoj, je kiuj partoprenis malpli ol du trionoj de la Komitatanoj; decidoj de la Komisiono, se ne respondis du membroj.

36. Por esplori iujn problemojn, la Komitato ĉiam povas elekti inter aŭ ekster si specialajn komisionojn, sed ne rajtas transdoni al

ili siajn kompetentecojn. Same la Komisiono de UEA povas peti la kunlaboron de Fakestroj, Delegitoj, k. t. p. La Komitato decidas pri kredito donata al la membroj de la Komisiono por iliaj administraj kaj vojaĝaj elspezoj.

Honoraj Rerezentantoj.

37. Honoraj Rerezentantoj de UEA estas personoj, elektitaj por tri jaroj de la Komisiono, kiuj pro sia sperto, aŭtoritateco aŭ socia pozicio povas utili al la Asocio. Ili patronas la propagandon, helpas okaze de klopodoj ĉe aŭtoritatoj aŭ estraroj, kaj reprezentas kun la Delegito la asocion ĉe publikaj manifestacioj. Ili devas esti membroj kaj ne havas administran rolon.

Kongreso.

38. Okazas ĉiujare Kongreso de UEA, kies lokon, tempon kaj kondiĉojn fiksas la Komitato.

La Kongreso:

Aŭdas la oficialajn raportojn;
Ekzamenas la moralan kaj financan situacion de la asocio;
Esploras la proponojn de la Komitato kaj de la membroj; kaj fiksas laŭ tio la ĝeneralan agadon por la proksima jaro.

La Prezidanto de UEA gvidas la kongreson; la protokolisto estas elektata de la kongresanoj. Rajtas voĉdoni ĉiuj membroj pagintaj la kongreskarton. La traktotaĵoj devas esti konatigataj en la oficiala gazeto, la ĉefaj raportoj kaj proponoj estas presite disdonataj al la kunvenintoj.

La Kongreso aprobas aŭ malaprobas la raportojn, kaj decidas pri la proponoj en formo de deziresprimoj al la Komitato.

Centra Oficejo.

39. La Centra Oficejo de la asocio konsistas el *Direktoro*, *Vicdirektoro*, oficistoj kaj helpantoj. Direktoro kaj Vicdirektoro estas elektataj de la Komitato, ilian salajron kaj eblan kontrakton fiksas la Komisiono. Ili ne povas esti Komitatanoj, sed havas en la Komitato kaj Komisiono konsilan rolon kaj proponrajton.

40. Se momente ne estas trovebla sperta Direktoro, aŭ se ĉi-tiu ne povas dediĉi sian tutan tempon al la ofico, la Komisiono elektas profesion oficejstron kun la titolo: *Ĝenerala Sekretario de UEA*. La Komisiono decidas, kiuj el la direktoraj kompetentecoj iras al la Ĝenerala Sekretario, kaj kiujn ĝi rezervas al la Direktoro aŭ al unu el siaj membroj.

41. La Direktoro gvidas la administradon konforme al la agadplano de la Komitato kaj klopodas por la disvastigo de la asocio. Li reprezentas ĝin en ĉiuj kutimaj administraj aferoj kaj subskribas en ĝia nomo. Por negocoj de li kontraktitaj, kiuj superas lian agadrajton, li restas responda ĝis ili estas formale aprobitaj.

La Vicdirektoro helpas kaj anstataŭas la Direktoron. Kun la konsento de la Prezidanto, la Vicdirektoro povas memstare prizorgi administran departementon kaj subskribi por ĝi.

42. La Direktoro, la Ĝenerala Sekretario kaj la Centra Kasisto deponu mongananton ĉe banko, laŭ kondiĉoj fiksataj de la Komisiono.

La Direktoro dungas la oficistojn kaj helpantojn, fiksas iliajn laborkondiĉojn kaj salajrojn. Al la centra kasisto, kaj al po unu sekretario por la administrado kaj por la gazeto, li povas doni la subskribaĵon por iliaj funkcioj.

La Centra Oficejo konservas la bibliotekon kaj arĥivejon de la asocio.

43. Post novjaro la Direktoro raportas al la Komitato pri la stato de la asocio: Oficejo, gazeto, teritorioj, fakoj, k. t. p. Al la kongreso li submetas ekstraktan de tiu jara raportoj kaj skizon pri la ĝiskongresaga agado. Laŭbezone li raportas al la Komisiono, kaj li informas la Prezidanton pri gravaj okazintaĵoj. Li tenas liston de la plendoj.

La Direktoro redaktas la "Oficialan Jarlibron", la "Oficialan Informilon" en la gazeto, kaj eblan bulleton. Al la aprobo de la Prezidanto li submetas la regularojn pri administrado, kasaferoj, kaj entreprenoj. Devas esti aprobitaj de la Komisiono: Eksterordinaraj elspezoj; la starigo de novaj servoj; ĉiuj kontraktoj kaj eblaj procesoj, kiuj ne koncernas la kutiman administradon aŭ estas gravaj por la eksteraj rilatoj de la asocio.

Oficiala Gazeto.

44. La asocio eldonas je sia risko kaj profito la gazeton: "Esperanto". Skribas ĝin tute aŭ parte *Redaktoro*, elektita de la Komitato. Lian salajron kaj eblan kontrakton fiksas la Komisiono.

La gazeto estu gvidata laŭ la ĝisnuna tradicio kaj enhavu nenion kontraŭ la celoj aŭ la intereso de la asocio. Escepte tio, la Redaktoro ĝuu en sia laboro plej eblan liberecon.

La Redaktoro klopodas gajni kunlaborantojn, prefere senpagajn, kaj korespondas kun ili. Por la parto de li redaktita, li portas la leĝan respondecon. El ĉiuj alsenditaj presaĵoj la unua ekzemplero apartenas al la biblioteko de UEA, la aliaj al la Redaktoro aŭ la kunlaborantoj. La Redaktoro fiksas interkonsente kun la Direktoro la detalojn pri labordivido kaj aperado, konforme al la disponebla mono. Se necese, decidas la Prezidanto.

45. La Centra Oficejo administras kaj eldonas la gazeton. Ĝi aperigas la parton oficialan, eble aliajn, kaj la anoncojn.

La Direktoro fiksas la kutimajn rabatojn al revendistoj kaj anonco-agentoj; li starigas la prezojn por anoncoj, por la aldonado de fremdaj presajoj, k. t. p., malakceptante tion, kio estas kontraŭ la celoj aŭ la bonaspekto de la gazeto, aŭ povus ofendi la membrojn.

Pri la abonprezo por membro-abonantoj decidas la voĉdonado de la Delegitoj, tiun por ne-membroj fiksas la Direktoro, aŭdinte la Redaktoron.

46. La gazeto estas administrata laŭ komercaj metodoj kaj debiti-gata je ĉiuj kostoj, kiujn ĝi kaŭzas. Ebla profito estas uzata por ĝia plibonigo, kaj favore de la Redaktoro, de la kunlaborantoj kaj de la varbintoj de abonoj aŭ anoncoj. Se la gazeto ne povas ekzisti el propraj rimedoj, la Komisiono metas je la dispono de la Direktoro krediton el la Asocia kapitalo.

Estas submetataj al la Prezidanto: Kontraktoj pri perioda ludonado de pagoj por teksto aŭ anoncoj; kontraktoj kun presistoj por pli ol du jaroj, aŭ kun societoj uzontaj la gazeton kiel oficiala organo; urĝaj plialtigoj de la kredito kaj similaj gravajoj.

La Komisiono estas kompetenta decidi pri ĉio kio koncernas la gazeton kaj ĝian eldonadon, kaj ŝanĝi en okazoj de urĝa bezono la aranĝojn fiksatajn en tiuj tri artikoloj.

V. Administrado.

Financoj.

47. La asocio kalkulas laŭ svisaj frankoj.

La Direktoro fiksas la oficialan prezon de la kotizoj por ĉiu lando en nacia mono, konforme al la kurzo kaj la praktikaj bezonoj.

La Prezidanto rajtas provizore malaltigi la prezojn por landoj kun kurzoj tiel malfavoraj rilate al la svisa; ke plenaloraj prezoj malhelpus grandan parton de la tieaj Esperantistoj daŭrigi ilian membrecon.

Se kontraŭe la svisa mono multe perdas de sia laŭleĝa valoro, la Komisiono povas provizore deklari la oficialajn prezojn de alia lando kiel normalaj, kaj rilatigi al ili la tabelon de la kotizoj.

La monhavaĵo de UEA konsistas el: la Centra Kaso, la kasoj de la Teritorioj kaj de la Fakoj, la kapitalo de la Garantiantoj, kaj la Asocia kapitalo.

48. La *Centra Kaso* estas administrata de la Direktoro aŭ Vicdirektoro kun la helpo de Centra Kasisto. Tiu kaso prizorgas la kutimajn spezojn de la asocio. Ĝi ricevas la kotizojn, abonojn, flankajn gajnojn kaj la donacojn ne superantaj po Fr. 500, kaj pagas ĉiujn salajrojn kaj kostojn de la centra administrado kaj gazeto.

Laŭ regularo aprobita de la Prezidanto, la centra kaso malfermas kontojn al la membroj, faras librotendajn laborojn por aliaj partoj de la asocia havaĵo, kaj povas funkcii kiel pagejo por fremdaj entreprenoj. La alsendataj monsumoj aŭ ĉekoj vojaĝas je la risko de la sendinto. Ili estu adresataj al la Oficejo kaj ne al privataj personoj.

En landoj, el kiuj mono estas sendebla nur malfacile aŭ kun kurzperdo, la Direktoro povas elekti fidindan membron aŭ bankon kiel *Peranto-Reprezentanto*. Ĉi-tiu enkasigas la monon kaj provizore ĝin konservas kiel havaĵo de la Asocio.

La Direktoro sendas kvaronjarajn konteltirojn al la Prezidanto. La jara bilanco, se eble kun buĝeto, devas esti aprobita de la Komisiono kaj Komitato, kaj publikigata en la oficiala gazeto. Ĉiujare kontrolas la kason reprezentanto de banko, elektita de la Komisiono.

49. La *kasoj de la Teritorioj* administras la Ĉefdelegito, aŭ kasisto elektita de la Delegitoj.

Pri la *kasoj de la Fakoj* decidas la fakaj statutoj.

La *Kapitalo de la Garantiantoj* konsistas el la pagoj de la Dumvivaj Membroj kaj el donacoj al ĝi destinitaj. Ĝi celas plifortigi la financon situacion kaj disvastigi la laborkampon de UEA. Sub la kontrolo de la Komisiono, la Garantiantoj administras la kapitalon mem, kaj, escepte Art 60, ne povas esti senigataj je iliaj akiritaj rajtoj. La atestoj de la mortintaj Garantiantoj apartenas al la Asocio. Por estontaj Dumvivaj Membroj, la voĉdonado de la Delegitoj povas fiksi aliajn kondiĉojn.

50. La *Asocia kapitalo* konsistas el la havaĵo ricevita per donacoj, heredaĵoj, k. t. p. Ĝi estas konservata kaj administrata ekster la Centra Oficejo. Por tiu celo la Komisiono elektas Komitatanojn kiel Administrantojn.

Tiu kapitalo formas la ĝeneralan rezervon de la Asocio, el kiu ĝi kreas novajn aranĝojn aŭ pagas jarajn deficitojn. La Komisiono povas rajtigi la Administranton, ke li aĉetu de la Centra Kaso fremdlandan monon, atendante la supreniron de la kurzoj, kaj donu en urĝaj kazoj tujan monhelpon al la Centra Kaso. En la jara bilanco klare vidiĝu, kiom entute ricevis aŭ alpagis la asocia kapitalo.

Spekulacioj kun la havaĵo de UEA estas formale malpermesataj.

51. Pri finiĝo de la asocio decidas la skriba voĉdonado de la membroj, kaj, se la situacio ne plu ebligas tiun procedon, decidas la Delegitoj aŭ la Komitatanoj. Devas esti pagataj la ŝuldoj kaj la atestoj de la Garantiantoj. La restanta havaĵo estas deponata tri jarojn, favore de Esperantistoj kiuj intencus refondi similan societon. Se tio ne okazas, la havaĵo estas donacata al alia internacia asocio kun idealaj celoj, kiun nomigas la decido pri la dissolviĝo.

Proponoj kaj Voĉdonoj.

52. Ĉiu membro povas sendi al la Centra Oficejo liston de kandidatoj por asociaj elektoj kaj mallongajn proponojn pri la agado de la Asocio, presotaj en la oficiala gazeto, tiom, kiom la spaco permesas.

Dek membroj rajtas peti de la Direktoro la okazigon de voĉdonado de la Delegitoj. La Direktoro publikigas la peton en la oficiala gazeto aŭ bulteno, kaj, se 60 tagojn poste la kvinono de la Delegitoj postulas voĉdonon, li organizas ĝin en tempolimo de pliaj 60 tagoj.

53. Ĝenerala voĉdonado de ĉiuj membroj okazas:

Se la Komitato ĝin decidas,

Se la kvinono de ĉiuj membroj ĝin skribe postulis en tempolimo de ses monatoj, kalkulitaj de la unua ĝis lasta subskribo. La Direktoro ĝin aranĝas kun la helpo de la Delegitoj, plej malfrue tri monatojn post ricevo de la subskriboj.

Tiu voĉdonado povas laŭleĝe nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la statuton kaj dissolvi la asocion.

54. La Centra Oficejo okazigas ĝeneralan voĉdonadon de la Delegitoj, kutime dum oktobro-novembro:

Por elekti la Komitaton de UEA, ĉiun trian jaron,

Por fiksi la kotizojn aŭ ŝanĝi la statuton,

Por aliaj aferoj, laŭ decido de la Komitato aŭ Komisiono, aŭ la iniciato de la membroj.

Ĉiu Komitato, Ĉefdelegito, Fakestro kaj Delegito havas unu voĉon. Duobla ofico ne donas plian rajton. Delegitoj en lokoj kun 10—19 membroj havas 2 voĉojn, kun 20—29 tri, kaj ĉiam plian voĉon por komenkata deko. La nombron de ĉiuj voĉoj fiksas la Centra Oficejo, konforme al la membra kontrolo. Valoras la nombro de la membroj kiuj estis notitaj en la kontrolo je la fino de la monato antaŭa al la oficiala publikigo de la voĉdonado en la gazeto. Se la aparteneco de membro estas ne certa, ĝi kalkulas favore de la Delegito, kiu kvitancis ĝian lastan kotizon. Sekretarioj en grandurboj, ricevintaj multajn senperajn aliĝojn, disdonu la voĉojn al la Delegitoj en la koncernaj urbopartoj.

55. Antaŭ la elekto de nova Komitato, la funkcia Komitato decidas el kiom da personoj konsistas la nova Komitato, kaj kiom da reprezentantoj ricevos ĉiu lando aŭ grupo de landoj. Plie la Komitato publikigas en la oficiala gazeto plenan liston de kandidatoj. En la sekvanta numero de la gazeto la Direktoro konatigas la proponojn intertempe alsenditajn de la membroj. La Delegitoj povas voĉdoni favore de iu membro, egale ĉu ĝi estis publikigita kiel kandidato aŭ ne.

Por la rezultato valoras en principo la plimulto de ĉiuj voĉoj. Tamen lando aŭ grupo de landoj, rajtigita je certa nombro de reprezentantoj, ricevas ilin, eĉ se ĉi-tiuj kandidatoj kunigis malpli multajn voĉojn ol kandidatoj el aliaj landoj.

